

ESPERANTO

INTERNACIA REVUO ESPERANTISTA

N-ro 504

OKTOBRO 1947

Ĉiu serioza Esperantisto, ĉu komencanto, ĉu progresinto, serĉas konstantan normon pri uzo de vortoj. Post longa intertempo denove estas havebla tiu jam fama konsultilo, kun ampleksaj klarigoj kaj citaĵoj el Zamenhofaj verkoj, la Tria Eldono de

PLENA VORTARO DE ESPERANTO

de E. Grosjean-Maupin, A. Esselin,
S. Grenkamp-Kornfeld, G. Waringhien.

Esperanto-Esperanta.

Prezo £1 angla, afranko 9p.

Bonvolu atenti, ke ĉi tiu estas fotografa (ofseta) represado de la dua eldono, sed NE reviziita eldono. Tiu ne aperos ĝis post tre longa tempo.

Mendu ĉe

UNIVERSALA ESPERANTO-ASOCIO,
Heronsgate, Rickmansworth, Herts., Anglujo.

Ni bedaŭras ke ni ne povas akcepti mendojn el landoj de kie oni ne povas sendi pagon al ni.

ANONCETOJ

Kosto : du pencoj por ĉiu vorto, aŭ internacia respondkupono por ĉiu duo da vortoj.

Ŝakistoj. Esperanto-fako de I.C.C.A. organizas korespondturnirojn. Informojn sendos D-ro V. Faigl, Zlonice, Ĉeĥoslovakujo.

La Kvakerismo (Religia Societo de Amiko)—Por senpaga ekzempleroj de literaturo (en Esperanto kaj kelkaj Eŭropaj lingvoj) skribu al Friends Service Council, Friends House, Euston Road, London, N.W.1, Anglujo.

Germana Esperantisto, librokomercisto 59-jara, deziras korespondi tutmonde. Certe respondos. Peter Hochbruck, Kaiserstr. 36, (17a) Karlsruhe, U.S. Zono, Germanujo.

Ĉu vi jam aliĝis al la Gildo de Sankta Ajdan? Ni bonvenigos aĵojn kaj perantojn en ĉiuj landoj. Nenia kotizo. Senpagan broŝuron de: Ajdanestro, Rectory, Chilton Cantelo, Yeovil, Somerset, Anglujo.

Rikardo Vandagnotto, Hipólito Irigoyen 434, 3a etaĝo, Ap. B., Buenos Aires, Argentino, deziras interŝanĝi poŝtkartojn kun ĉiuj landoj. Nepe respondos.

Ne-Katolikoj, kiuj deziras informojn pri la katolika religio povas ricevi ilin senpage de la Internacia Katolika Informejo, Fraterhuis, Loonopzand, Nederlando.

Usonaj fraŭlinoj! Oni vokas vin partopreni la Espromovadon! Ne lasu ĉion al niaj fremdlandaj helpantinoj. Deziras korespondi kun vi 34-jara scivolemulo Fred. L. Broening, 107 E. Montgomery Street, Baltimore 30, Md., Usono.

Niaj geamikoj F-ino Ursula Nowicki, 29-jara, Berlin N.113, Wisbyer Strasse 61, S-ro Do-vaŭ-Phaŭ, 21-jara, Saigon, Indocinujo, 39 place de Dakar, kaj ni Gertrud kaj Gerhard Klau, Berlin-Zehlendorf (1), Seehofstrasse 24, iam en Görlitz-Silezio, serĉas gekorespondantojn.

Tutmonde deziras interŝanĝi belajn filatele afrankitajn bildkartojn Jiří Páv, VIIIa klaso de realgimnazio, Jaromér, Ĉeĥoslovakujo. Respondo garantiata

23-jarulino deziras korespondi Esperante aŭ anglalingve kun kulturita persono : F-ino Rosa A. Onorato, Rivadavia 6660, dpto 7, Buenos Aires, Argentino.

S-ro Iv. H. Krestanoff, Prof.-publicisto en Pirdop (apud Sofia), Bulgarujo, perdinte ĉion dum la militbombardo en Sofia, deziras ricevi interŝanĝe je siaj Esperverkoj ĉiujn antologiajn aperintajn en Esperanto. Bonvolu anonciĝi.

Letervesperon aranĝos la Bremena Grupo en oktobro. Ĉiulandaj gesamideanoj skribu multnombre unue al Gerhard Schulz, (23) Bremen-St. Magnus, Lesumer Heerstr. 34. Respondo garantiata.

Jurnalisto deziras korespondadi tutmonde kun gazetistoj kaj ĵurnalistoj. Interŝanĝo de artikoloj kaj gazetfotoj. Skribu al Wilhelm Drinkow, (20a) Hannover, Stormstr. 18/1, Germanujo, Brita Zono.

St. Karidov, str. Levsky 4, Burgos, Bulgarujo, deziras korespondi kun tutmondo kaj interŝanĝi p.m. neuzitajn. Respondo garantiata.

Averto. Arthur C. Oliver, Rickmansworth, Anglujo, avertas ke kvankam lia nomo aperis sen lia permeso en la "Tutmonda Adresaro" eldonita en Vieno, li ne povas akcepti novajn korespondantojn.

Dank' al Esperanto fianĉigis 21-8-1947 Betsy Wagenaar, Sekr-ino de R. K. Esp. Klubo, Alkmaar, Nederlando, kaj Robert Frochoux, DM kaj Del. de U.E.A., Boudry, Svisujo.

Deziras interŝanĝi poŝtmarkojn kun ĉiuj landoj: Francisco Fafné, Granios 13, Tarrasa (Barcelona), Hispanujo.

Deziras korespondi kun komencantoj el la tuta mondo pri ĉia temo, speciale kun Italujo, Danujo, Norvegujo, Irlando, Hispanujo, kaj Algerio, S-ino Harold S. Schroeppel, 332 N. Cherry Street, Galesburg, Illinois, Usono.

Letervespero. Gesamideanoj el la tuta mondo sendu viajn leterojn, bildkartojn, k.t.p., al la Haarlema sekcio de la Ned. Unuiĝo "L.E.E.N.," kiu aranĝos letervesperon je la fino de Decembro 1947. Al ĉiuj ni sendos respondon. Adreso : S-ro W. ter Braake, Zijlstraat 41 rood, Haarlem, Nederlando.

Mi volas korespondi kaj interŝanĝi p.m. kaj pk. en la tuta mondo. Mi respondos al ĉiu. Mi kolektas p.m., pk., kaj leterojn. Skribu al la adreso : Profous Ruda oficisto, Mělník III, tr. mar. Koněva 80, Ĉeĥoslovakujo.

Petu belaspektan turistan broŝuron senkoste pri Boschvoorde : Delegito turista, Garennes 107, Boschvoorde, Belgujo.

Marie Conet interŝanĝas ĉiulandajn p.m., 230 Verdunstr., Brussel-Haren, Belgujo.

Kiu volas gastigi kontraŭ reciproka servo Finnian Esperanton? Esperanto-Centro, Nieuwland 198, Brussel, Belgujo.



Specimenon de bonkvalita blankiga tolaĵbluo sendas al ĉiu sendinto de 3 int. respondkuponoj



S-ano A. SEDLAK, fabrikisto,

Doksy apud Mácha-lago, Ĉeĥoslovakujo,

kiu dediĉas 20% de la nespezita sumo al la loka Esperantista klubo.

ESPERANTO

INTERNACIA REVUO ESPERANTISTA

40a JARO N-RO 504 (10)
Oktobro 1947

Oficiala organo de
Universala Esperanto-Asocio

Fondinto :

H. HODLER

Redaktoro :

HANS JAKOB

Helpredaktoro :

MASON STUTTARD

Cion por la redakcio sendu al
ESPERANTO
Palais Wilson, Genève, Svis.

Cion pri administrado de UEA
kaj de la revuo ESPERANTO,
abonado, reklamoj, anoncetoj
sendu al

UNIVERSALA ESPERANTO-ASOCIO
Heronsgate, Rickmansworth
Herts., Anglujo

Jara abono : 8 ŝil. anglaj
(kun membreco kaj jarlibro
12s. 6p.)

Ĉefdelegitoj kaj Perantoj en
multaj landoj

Tarifo por reklamoj :

1 paĝo - £5 anglaj
½ paĝo - 50 ŝil. anglaj
¼ paĝo - 25 ŝil. anglaj
⅛ paĝo - 12.5 ŝil. anglaj

Anoncetoj pri korespondado :

2 pencoj por unu vorto aŭ
1 int. respondkupono por ĉiu
duo da vortoj

Legantoj en 65 landoj

SENCO KAJ CELO

de la faka movado Esperantista

Universala movado kia la nia devas priatenti ĉiujn eblojn por sukcesigi propran celadon. Pro tio ni ĝoje salutas ĉiun klopodadon apartan, kiu celas akceptigi Esperanton en tiu aŭ alia medio. Jam frue oni kreis tiajn apartajn grupigojn por ligi Esperanton kun alia celo ; kaj se ni hodiaŭ parolas pri faka movado en Esperanto, ni komprenas sub tio tre diversajn aferojn. Alia esprimo por tiu ĉi branĉo de nia movado estas *specialista*, kaj ĝi iamaniere pli trafe nomas la infanon. La senco de la faka movado estas en tio, ke ĝi laboras por Esperanto tie, kie la ĝenerala movado pro diversaj kaŭzoj nenion povas fari. Ĝi radikas en la ĝenerala movado kaj ne povus vivi izole. Unu kompletigas la alian.

Se la senco de tiu ĉi aparta klopodado ŝajnas tute klara, pri ĝia celo ne regas unuforma kompreno. Oni povas aserti, ke ĉiuj fakaj grupigoj Esperantistaj havas nete propagandan karakteron por Esperanto. La alia eblo, ke Esperanto estas nura helpilo, ke la ĉefa celo estas progresigi tiun ĉi apartan aferon, jam estas eluzita. Pri tio ni parolos alian fojon.

La celo de la por-Esperanta faka movado estas do interesigi samfakanojn pri Esperanto. La ĝisnuna klopodado dependas de multaj faktoroj kaj estas pli ofte rezulto de spontanea entuziasmo ol de metoda kaj sistema celkonscia agado. Kio necesas kaj kion ĉiu devus akcepti, estas pli intima kunlaboro kun la ĝenerala movado, ne per belfrazaj deziresprimoj, sed per praktikaj aranĝoj. Tia kunlaboro estas ebla en multaj rilatoj, malgraŭ la deviga distanco, kiun devas atenti U.E.A. pro sia neŭtraleco. Unu el la praktikaj laboroj estas la preparo de la fakaj (teknikaj, specialistaj) vortaroj. Ni opinias ke tiu ĉi laboro estas la plej necesa kaj plej urĝa. Urĝa estas ankaŭ la aliĝo de la fakaj grupigoj al U.E.A. kaj oni povas antaŭvidi, ke iuj fakaj grupigoj povus delegi reprezentanton en la komitaton de U.E.A. Se la profaka apartiĝo estas komprenebla, ĝi ne estas tia rilate al Esperanto. La lingvo kaj ĝia ĝenerala uzado estas la komuna platformo, sur kiu povas troviĝi eĉ la plej malsamaj celadoj. Nia taktiko estu : Marŝi dise, sed bati unuigite.

H.J.

32-a UNIVERSALA KONGRESO DE ESPERANTO, Berno, 1947

Fakaj kaj specialistaj kunvenoj

dum la 32-a

La impona partopreno en la 32-a kongreso, malgraŭ la sen nombraj komplikaj (vizoj kaj devizoj!) montriĝis ankaŭ en la nombro de la fakaj kaj specialistaj kunvenoj. Ne malpli ol 14 fakaj organizaĵoj aranĝis kunvenojn, kiuj laŭ la raportoj estis kontentige vizitataj. La fakaj kunvenoj dum kongreso Esperantista formas elementon necesegan. Ili montras la vivantecon de la lingvo, ili altiras homojn por kiuj la ĝenerala kongreso estas afero jam tro konata, ili povas diskuti problemojn pri kiuj la ĝenerala kongreso havas nek tempon nek povon.

Estis nia intenco raportoj en unu numero de *ESPERANTO* pri la tuta kongreso. La manko de spaco kaj de tempo por ĉion pretigi je ĝusta momento ne permesis tion. Ni tamen devas ree tuŝi tre gravan punkton: por enpresigi ĉion kion ricevas la redakcio de *ESPERANTO*, ni devus eldoni la gazeton ĉiusemajne. Tio ne estas ebla. Rezultas do, ke la raportoj enpresataj devas esti plej koncizaj, plej koncentritaj, kaj sin limigi nur al faktoj. Komence de la 32-a ni sendis al ĉiu faka organizaĵo inviton redakti la raportojn kiel eble plej mallonge. Iuj sekvis tiun ĉi peton, aliaj kontraŭe raportegis! Raportintoj sekve ne miru, se ili trovas sian laboraĵon mallongigita.

Bahaanoj

Kunveno okazis jaŭdon 30.VII je la dua horo posttagmeze en la *Foyer* de la Kazono, kie ankaŭ la bela kaj interesa Bahaa ekspozicio (la sola fakekspozicio) ĝojigis la kongresvizitantojn dum la tuta semajno. Ĉeestis la Bahaan fakkunsidon interesatoj el Anglujo, Belgujo, Bulgarujo, Ĉeĥoslovakujo, Francujo, Danujo, Nederlando, Germanujo, Svisujo, Irako, Norvegujo, Svedujo, kaj Usono. La Bahaanoj mem estis el kvin diversaj landoj.

La fakkunsido estis malfermata de la Bahaa reprezentantino de Svisujo, S-ino Elsa Steinmetz, kiu bonvenigis la venintojn kaj prezentis la du parolantojn, S-inon Etty Graeffe el Usono, kaj S-ron Vuk Echtner el Ĉeĥoslovakujo. S-ino Graeffe mallonge prezentis la Bahaajn principojn kaj programon, kaj S-ron Vuk Echtner, post koraj kaj sinceraj dankvortoj el la registaro de Svisujo, pritraktis la temon *Ĉu universala lingvo garantias mondpacon?* Lia konkludo estis ke kvankam "nuntempe la plej grava afero estas, ke oni komprenu kaj estu komprenata" (Abdul Baha), internacia lingvo tamen estas nur unu ŝtupo al la celo—mondpaco. La ceterajn ŝtupojn, tute tiel gravajn kaj necesajn por la starigo de mondspaco, oni trovas en la instruoj kaj leĝoj de Baha'u'llah, la granda Profeto por tiu ĉi tempo, la Die inspirita mondedukanto.

Denaska Esperantistaro

Ĉeestis 35 gesamideanoj. Prezidis S-ro J. Guillaume. Sekretario S-ro Muesch.

S-ro Guillaume petis senkulpigon pro la neĉeesto de nia kara Prezidanto, S-ro R. Robertson, kiu ne povis veni pro sia granda aĝo.

S-ro Muesch legis la raporton de la Prezidanto de D.E. Ĝi estis unuanime akceptita.

S-ro Braet de la movado T.J.O. legis la projekton de Kontrakto inter D.E. kaj T.J.O.

Reprezentantoj: Konsentis esti landaj sekretarioj:—

Aŭstrujo: Emil Vokal, Wien XV, Preysing 4/23.

Belgujo: Carlos Braet, Esseboomstraat 1, Brugge.

Ĉeĥoslovakujo: Ges-roj Sue kaj Dolfá Bartošik, Praha XVI, Na ĉernem vrchu 31.

Francujo: F-ino Saurin, Villa Clémence-Isaure, 2 Avenue Desambrois, Nice.

Grekujo: D-ro Anakreon Stamatiadis, Str. Rodou 23, Athens 6.

Estraranoj: S-ro B. C. Ohana, 1 rue de la Kasbah, Marrakech, Maroko; S-ro Beau, Marseille.

D-ro P. Neergaard, Kopenhago, faris varban paroladeton por la aperonta gazeto *Esperantologio*. Li petis, ke la samideanoj skribu al li pri siaj spertoj kun la Esperanto-parolantaj infanoj.

S-ro Vokal instigas, ke per praktiko ni pruvu la taŭgecon de nia movado, ekzemple per akcepto de suferantaj infanoj.

S-ro Vanĉik proponas eldonon de ilustritaj libroj por infanoj, kiuj havas malpli ol ses jarojn, ĉar ili ŝatas bildojn kaj desegnojn.

S-ro Braet respondis, ke ĝuste tion intencas fari ankaŭ T.J.O.

Laŭ propono de S-ro Ohana, D.E. devas laŭstatute peti de U.E.A. la mencion pri landaj sekretarioj (laŭeble pri *Geonkloj*) en la jarlibro de U.E.A.

S-roj Emil Vokal kaj A. Krolenbaum atentigas pri la mizero en Aŭstrujo, Britujo, kaj Polujo.

Oni unuanime akceptis la jenan rezolucion: Ni petas ke D.E. helpu la infanojn kiuj nuntempe tre suferas, kaj se eble, ke oni invitu ilin al feliĉaj landoj dum kelka tempo.

S-ro Vanĉik proponas, ke oni faru bibliografion pri porinfana literaturo, kaj ke koncerne la verkadon de la originala Esperanta porinfana literaturo, oni sin turnu al Julio Baghy, kiu povus verki ion por infanoj.

S-ino E. van Veenendaal sendis leteron al la kunsido, per kiu ŝi esprimis deziron pri multa sukceso.

Instruistoj

La Internacia Instruista Kunlaboro kunvenis du fojojn dum la kongreso. Prezidis Einar Dahl, Svedujo, kaj F-ino Jeanne Dedieu, Francujo funkciis kiel sekretario. Bondezir-telegramon sendis la Hebrea Universitato en Jerusalemo. Partoprenis la kunvenojn proksimume okdek instruistoj el 12 landoj.

Pri la starigo de provizora komitato — Internacia Instruista Kunlaboro — raportis Einar Dahl. Reprezentantoj de tiu ĉi komitato jam ekzistas en 17 landoj. Pri la situacio en la unuopaj landoj raportis, inter aliaj, F-ino Dedieu, F-ino Jay, Britujo, S-roj Baas, Nederlando, Frey, Aŭstrujo, Ohana, Maroko, Dahlmann, Germanujo, Woznick, Polujo.

Oni decidis prepari, se eble, internacian semajnon de instruistoj kaj porinfanan restadon en Svedujo en 1948. Estis akceptata rezolucio direktata al la pedagogia mondo, invitanta ĝin akceli la lernadon de Esperanto.

Ĵurnalistoj

La kunveno de la Tutmonda Esperantista Ĵurnalista Asocio okazis la 28-an de Julio kaj ĉeestis 21 fakanoj el 9 landoj. Prezidis D-ro Arthur Baur, Berno.

La raporto de la ĝenerala sekretario, Einar Adamson, Göteborg, Svedujo, pri la ĝisnuna agado de la Asocio estis akceptita kun danko al la verkinto. Oni diskutis la definitivan statuton kaj akceptis ke estu du kategorioj de membro, nome profesiaj ĵurnalistoj kiuj posedas profesian legitimon (Kategorio A) kaj liberaj ĵurnalistoj (Kategorio B).

Estis akceptita propono, ke T.E.Ĵ.A. kontaktigu kun la estontaj L.K.K.-oj de niaj universalaj kongresoj por kiel eble plej multe akceli bonan informadon pri la kongreso antaŭ kaj dum la kongresoj. Diskutita estis ankaŭ da profesiaj problemoj, interalie la rilato de T.E.Ĵ.A. kun la gravaj ĵurnalistaj asocioj, la kreo de internacia legitimo ĵurnalista, perado kaj interŝanĝo de artikoloj.

Resume: bona kaj utila laboro. Informojn pri T.E.Ĵ.A. donas Einar Adamson, 18 Vermlandskatan, Göteborg, Svedujo.

Katolikoj

La Katolikoj, kiel kutime dum Esperanta kongreso, havis diservon kiu okazis dimanĉe 27-an de Julio en la preĝejo de la S-ta Triunuo en Berno. Belga pastro de Maeyer predikis pri la sankta Triunuo, fonto de unueco.

Kunveno katolika okazis la 29-an, kiun prezidis nia malnova konata samideano, franciskana patro Modesto Carolfi. Kiel sekretario funkciis kapucen-pastro Sigismondo. P. Carolfi invitis je vigla celkonscia agado por Esperanto kaj Katolikismo por akceli veran pacon kaj la bonon. Li skizis la malfacilaĵojn kunvoki katolikan kongreson. Tio estas demando diskutata en konferenco okazonta dum Aŭgusto en Draekenburg, Nederlando.

Sekvis salutparoloj, diversaj raportoj kaj proponoj. Inter tiuj estis unu de S-ino Grafino de Brier, ke oni klopodu ke en Katolikaj revuoj kaj gazetoj aperu Esperanta angulo. Oni fine decidis sendi telegramon al Lia Papa Moŝto, Pio XII kaj al la Apostola Nuncio en Berno; plie leteron al Kardinalo Innitzer en Vieno. La bone vizitata kunveno finiĝis per komuna preĝo.

Kooperativanoj

El la tre detala protokolo, kiun ni ricevis pri la kunvenoj de la kooperativanoj ni ekstraktas:

Okazis du kunvenoj, 31.VII kaj 1.VIII, kaj oni prilaboris la jenan tagordon: Elekto de kunven-direktantoj, Fondo de Kooperativa Esperanto-Ligo, Elekto de provizora estraro.

La unuan kunvenon partoprenis 50 personoj. Malfermis S-ro Ager, prezidanto de la Kooperativa Esperanto-Ligo en Anglujo. Li skizis la celon de la kunveno, kiu devos starigi internacian ligan de kooperativanoj. S-ro Zawada raportis pri la ĝojiga sinteno de la Centra Asocio Kooperativa en Polujo, kiu tre favoras nian ideon. Ĉiusemajne aperas en la gazeto *Spółnota* (Komuneco) Esperanto-angulo, kaj en la korespond-kurso oni regule alvokas al lernado de Esperanto. Estas atendeble, ke ĉi tiu grava asocio helpas reeldoni la estintan Esperanto-organon *Ĉielarka Standardo*. Plie, la sindikato de la kooperativaj laborantoj disponigas en ĉiu numero de sia gazeto unu paĝon por Esperanto.

Kora aplaŭdo de la ĉeestantaro montris, ke oni bone komprenis la gravecon de lia metoda klopodado.

La ĉeestantoj elektis kiel prezidanton de la kunveno S-ron Ager, kaj kiel sekretario S-ron Zawada.

En la dua kunveno oni fondis *Tutmonda Ligo de Kooperativanoj-Esperantistoj*. Estis farataj diversaj decidoj pri statuto, oficiala gazeto, estraro kaj pri laboro entreprenota de la estraro. La provizora estraro estas: Hon. Prezidanto, D-ro Edmond Privat; Prezidanto, S-ro A. A. Ager; Vicprezidanto, S-ro Eric Descoeudres, Basel; Sekretario, S-ro Johano Zawada; Kasisto, S-ro Edvardo Bugajski. Oni decidis sendi salut-telegramon al D-ro Privat kaj fine aŭdis ankoraŭ

raporton pri la stato de Esperanto en kooperativaj medioj en pluraj landoj.

Kuracistoj

El la raporto pri la kunsido okazinta en Bern, 30an de Julio, ni ĉerpas:

Partoprenis 11 fakanoj kaj prezidis D-ro Kempeneers. Ĉeestis S-ino Wanda Zamenhof, okulkuracisto, kaj D-ro Anakreon Stamatidis.

D-ro Kempeneers koncize raportis pri la nuna stato de la Tutmonda Esperantista Kuracista Asocio. Post alvoko en la gazetaro alvenis el pluraj landoj aro da leteroj, kiuj kuraĝigis restarigi la Asocion.

Inter la diskutitaj problemoj citindaj estis aludo pri neceso ke internaciaj oficialaj organizaĵoj praktike helpu al la Intelekta Kooperado Internacia kaj ebligis al kiu ajn persono aboni eksterlandan gazeton.

Oni plie diskutis la rimedojn por enkonduki iom post iom en la faka gazetaro medicina Esperanto-resumojn de la ĉefaj artikoloj. Kelkaj jam faras tion, kaj oni daŭrigu en tiu ĉi klopodado. D-ro Kempeneers promesis sendi de tempo al tempo cirkuleron al la interesatoj por informi pri la stato de la afero. Estis decidite aranĝi medicinan kunsidon kun sciencaj prelegoj dum la kongreso en Malmö, 1948.

Militrezistantoj

Ĉi tiu estis unu el la plej viglaj el la fakkunsidoj. Parolis multaj pacifistoj el diversaj landoj kaj la esprimado kelkfoje estis forta.

La kunsidon malfermis W. Green asertante, ke laŭ lia opinio la tiel nomita interna ideo de Esperanto kaj la pacifismo, estas esence samaj. Ne utilas, li diris, paroli aŭ eĉ labori por la paco, se oni ne estas preta jam rezigni unu fojon por ĉiam la militon, private kaj nacie.

Parolis Richard Bland, iama urbestro kaj nuna urbestro de sia urbo. Li estis akirinta altan pozicion malgraŭ siaj pacifistaj kaj Esperantismaj kredoj. Li memorigis pri la privata devo de ĉiu, resti fidela al la fundamentaj ideoj de la pacifismo.

El la sekvantaj paroladoj evidentiĝis, ke la pacifismo tute ne estas mortinta nek malfortiĝinta dum la militaj jaroj. Okazis diskutado pri la formado de internacia pacifista rondo de Esperantistoj, sed la fina decido estis, ke tio ne estas bezonata nuntempe; tamen estis ĝenerala konsento pri la urga neceso, ke ĉiu ĉeestanto portu en sian hejmon la mesaĝon de la kunveno: Milito estas krimo kontraŭ la homaro kaj ni estas firme decidintaj neniam plu militi, nek subteni militon kaj militpreparadon, kiel ajn.

La 60 ĉeestantoj starigis kaj solene faris tiun juron, tiel ligante sin por ĉiam en komuna frateco por la bono de la homaro.

Policistoj

La policistoj kunvenis en Bern, la 1-an de Aŭgusto. Partoprenis policistoj Antoine Schwartz, ĉefkomisario, Strasbourg; Julio Baghy, polic-kapitano; Georgo Robitsek, polic-leŭtenanto; Balint Nagy (Hungarujo); kaj brigadisto Blauwbroek el Hago. Kiel reprezentantoj (nepolicanoj) S-roj R. M. Frey el Vieno kaj Baxter el Glasgovo.

Gvidis la kunvenon ĉefkomisario Schwartz, raportante pri la lasta kunveno okazinta en Parizo 1937. La Internacia Polica Ligo disigis dum la milito. Post diskuto la ĉeestantoj akceptis deziresprimon:

“Ke post prepara laboro en ĉiu lando, la Internacia Polica Ligo estu restarigata sur bazo de landaj ligoj: ke jam de nun funkcii internacia centro de korespondado inter policianoj.”

Plie oni akceptis rezolucion: La subskribintaj policistoj Esperantistoj, kunvenantaj la unuan de Aŭgusto 1947 dum la 32-a Universala Kongreso de Esperanto en Bern, post diskutado pri oportuno restarigi la organizaĵon Internacia Polica Ligo, decidas rekomendi al ĉiuj kolegoj Esperantistaj ĉiulandaj, organizi landajn asociojn kiuj kune formu la internacian ligon; petas kolegon Schwartz, Francan delegiton, agi tiucele por ke okazu venontjare dum la Internacia Konferenco en Parizo polica kunveno, kies celo estu la definitiva restarigo de la I.P.L. Subskribis Schwartz, Baghy, Robitsek, Balint Nagy, Blauwbroek.

POŝTMARK-KOLEKTANTOJ

El la raporto ricevita pri la kunveno de la poŝtmark-kolektantoj estas konstateble, ke la Internacia Asocio de Poŝtmark-Kolektantoj estas organizaĵo uzanta Esperanton kaj en ĝi Esperantistoj ludas gravan rolon. Raportis S-ro P. H. Lewis, fondinto kaj unua Organiza Sekretario. La nombro de membroj estas 720. El ili la triono scias Esperanton kaj uzas ĝin. Plu ol 100 jam petis ke oni instruu al ili la lingvon.

Al la Asocio aliĝis mondkonataj filatelistoj, inter ili ekzemple konsilantoj de la Reĝa Filatela Societo, kaj de la Brita Asocio. Ĉi tian kontentigan rezulton en la varbado inter ne-Esperantistoj filatelistoj faris neniu alia organizaĵo inter la Esperantistoj.

Kiel plej gravan sukceson, la raportinto informas pri la Internacia Poŝtmarka Katalogo, kies unua volumo baldaŭ aperos. Tiu ĉi grava verko enhavas artikolojn, teknikajn klarigojn, kompletan katalogon k.t.p. La pligranda parto

de la teksto estas en Esperanto. Lukse presata, tole bindata, tiu ĉi verko povas fiera stari apud similaj en naciaj lingvoj. Sed pli grava fakto estas, ke la konata firmo *Harris Publications Ltd.* (disvendistoj) akceptis dissendi la katalogon pere de sia organizado de distribuado. Oni baldaŭ povos vidi (kaj akiri) tiun ĉi verkon en ĉiu filatela butikoj en Britujo. Citinde estas ke S-ro Gordon Harris, la konsilanto de la Brita Filatela Asocio, aliĝis al I.A.P.K.

Oni diskutis pri la *Kurso de Esperanto* por filatelistoj, permane kopiita post elĉerpiĝo de la unua provizo. Tiun ĉi gravan laboron plenumis sekretariino M. de Rycke (Belgujo) kaj la kursgvidantino F-ino N. Hanson (Britujo). Nova kurso estas verkota de S-ro E. G. Lock, kunaŭtoro de *Nelson's Esperanto Course*, kunlabore kun la nomitaj samideanoj.

Vigla diskutado sekvis pri la kreo de praktika monsisistemo aŭ pagaraĝo inter la diversaj landoj. Informojn pri tiu ĉi faka asocio oni petu de P. H. Lewis, XPDO House, DIDCOT, Berks., Anglujo. Aldonu freŝan poŝtmarkon por la respondo.

P.T.T.-istoj

Okazis kunveno de la poŝtistoj, telegrafistoj kaj telefonistoj, sed en la momento de la redaktado raporto ankoraŭ ne venis.

Religianoj Liberalaj

Okazis 31-an de Julio kunveno de anoj de la Esperanta Unio de Liberalaj Religianoj. Nur Anglaj membroj ĉeestis, sed la Unio havas korespondantojn en kelkaj landoj. La du ĉefaj aferoj diskutitaj estis—

- (1) ĉu la Unio povas agi kune kun la Kristana Esperantista Ligo, aŭ la Bar-Rompantoj? Decido nea.
- (2) Diskutado pri propagando kaj aplikataj metodoj.

La Unio fondiĝis en Londono en 1946 kaj eldonis du numerojn de sia bulteno. Informojn pri la Unio donas E. H. Kersley, 29 Churchill Way, Peveerell, Plymouth.

Rotarianoj

La Esperantistaj Rotarianoj kiuj partoprenis la 32-an ĉeestis la kutiman lunĉon aranĝitan de la Berna Rotaria Klubo. Parolis pri nia movado S-roj Bartoschek, Vieno, Buchli, Bern, kaj Söderberg, Svedujo.

Sep Esperantistaj Rotarianoj el kvar landoj kunvenis por diskuti la eblon de pli vasta agado en la Rotariaj kluboj. Esperantistaj Rotarianoj anoncu sin ĉe C. C. Goldsmith, U.E.A., Rickmansworth, Herts., Anglujo.

Sciencistoj

Malfermis la kunsidon de la Internacia Scienca Asocio Esperantista S-ro E. W. Woodruff, Britujo, provizora Vicprezidanto. Li skizis la refondiĝon de la I.S.A.E. kaj li deklaris sin preta daŭrigi la laboron ĝis la venonta kongreso. Laŭregula estraro estos elektata por funkcii ĝis tiam. Ĉeestis la kunvenon 24 personoj. Oni diskutis la eldonon de gazeto aŭ informilo por krei regulan kontakton inter la membroj. Evidentiĝas ke la komplikaj en la transpago de mono el unu lando en alian estas tre grava malhelpo antaŭ realigo de ĉi tiu deziro.

La demando pri prezidanto estis diskutata kaj oni esprimis deziron pri fama sciencisto, kiu volus akcepti tiun ĉi rolon.

S-ro Makkink insistis, ke oni donu tutan atenton al la nacilingvaj fakrevuoj kaj ke oni klopodu pri enmeto de resumoj en Esperanto. D-ro Neergaard, Kopenhago, informis pri lingvosciencia gazeto aperonta sub nomo *Esperantologio*.

Samideanoj, kiuj volas aliĝi al I.S.A.E. sin turnu al S-ro E. W. Woodruff, 140 Mulgrave Road, Sutton, Surrey, Anglujo.

BALDAŭ DENOVE HAVEBLA

KOMUNA KANTLIBRO

Redaktita de H. W. kaj N. HOLMES

La ĉie-bezonata libreto
kun vortoj kaj muziko de

33 kantoj

64 paĝoj. Prezo 2 ŝil., afranko 2p.,
aŭ 9 respondkuponoj afrankite

Eldonita de

THE ESPERANTO PUBLISHING CO. LTD.
Mendu ĉe Universala Esperanto-Asocio

FINANCAJ PROBLEMOJ

Grava artikolo, kiun ĉiu membro devus legi

En multaj landoj ekzistas en la nuna tempo financa krizo pro tio, ke en tiuj landoj mankas valutoj de la landoj el kiuj oni volas importi nutraĵojn kaj krudaĵojn por fabrikado. Tiu manko estas tiom grava, ke en multaj landoj oni minacas plimalgrandigi la jam malgrandajn porciojn de nutraĵo, kaj ekzemple en Britujo oni atendas eventuale eĉ duonigon de la nunaj porcioj.

Tiu situacio estas tiom kriza en multaj landoj, ke oni jam dum iom longa tempo malpermesas la sendon de pagoj eksterlanden. Por movado kia la nia, dependanta grandparte de internaciaj kontaktoj, tiu malpermeso estas tre serioza malhelpo. Ni deziras akcepti membrojn en ĉiu parto de la mondo, kaj la Esperantistoj mem tre volas ricevi niajn gazeton kaj jarlibron, des pli ĉar ili dum jaroj povis ricevi nenian novaĵon pri la movado kaj pri Esperanto. Ni tial akceptis kelkajn centojn da membroj dum la nuna jaro malgraŭ tio, ke ni sciis, ke ekzistas tiuj malfacilaĵoj pri eventuala ricevo de la kotizoj pagitaj en la respektivaj landoj. Per diversaj rimedoj ni sukcesis iomgrade ricevi pagojn el iuj landoj, sed restas tuta ardo da landoj pri kiuj ni jam ne povas esperi.

Tiun problemon la Komitato esploris en Bern. Oni konstatis, ke se ni daŭre akceptus membrojn kaj sendus al ili la jarlibron kaj gazetojn sen kia ajn eblo ricevi la pagon, la tempo baldaŭ venus kiam ni bankrotos. Oni devas pagi la presistojn, kaj ankaŭ la oficejajn elspezojn. Kun bedaŭro do, la Komitato decidis, ke de nun ĝis plua avizo, ni ne povos akcepti membrojn en Germanujo, Hispanujo, Italujo, Jugoslavujo kaj Polujo. Ekzistas alia kvino da landoj en kiuj la situacio estas kriza, kaj povas esti, ke post nelonge la listo plilongigos. Se ni tamen povos iel sukcese aranĝi la aferon pri kiu ajn individua lando, ni kompreneble tuj ŝanĝos la regulon pri tiu lando.

Sed kio pri la kompatindaj Esperantistoj en tiuj landoj izolitaj? Ili tre volas ne perdi la ĝisnunan kontakton, kaj ni ne deziras, ke ili malaperu el inter nia anaro, eĉ dum mallonga tempo. Ni povas vidi nur unu solvon. Tial ke ni mem ne posedas la financajn rimedojn por subvencii ilin, iliaj amikoj en aliaj landoj helpu al ili per "adopto" laŭ la sistemo, kiun ni uzis pri kelkaj landoj tuj post la fino de la milito. Tiu sistemo ebligis al proksimume 250 personoj fariĝi membroj de nia asocio. Jen resumo de la metodo:

Membro en lando el kiu ni povas ricevi pagon, pagas la kotizon de amiko aŭ korespondanto en unu el la cititaj landoj. Li povos sendi la

kotizon senpere al ni, aŭ sendi ĝin pere de la Ĉefdelegito aŭ Peranto al kiu li kutime pagas la propran kotizon. La kotiztabelo por 1948 troviĝas sur kovrilo 3 de la nuna gazeto, sed ne estas necese fari kalkulon; oni simple pagu la kotizon, kiun oni normale pagus en enlanda mono. Ekzemple, se membro en Usono volas pagi kotizon MA de Pola samideano, li simple sendas al la Usona Ĉefdelegito la kotizon montritan en Usona mono, kun indiko, ke tio estas por S-ro X ĉe la adreso Y en Polujo (Britoj bonvolu noti, ke la kotizoj sen B.E.A. membreco estas MJ 5 ŝil., MA 12ŝ. 6p.).

Povas esti, ke iuj bonkoraj Esperantistoj ne havas korespondanton en la nomitaj landoj, sed tamen volas helpi Esperantistojn tie por montri la solidarecon de nia movado. Tiukaze, ili simple sendu la pagon al ni, aŭ al la kutima pagejo, kun la informo ke tiu sumo estas por pagi la kotizon de tiom da personoj en indikata lando. Se oni ne indikas la landon, ni mem elektos la "adoptatojn" kaj informos respektive ambaŭ personojn. Ni opinias, kaj tre esperas, ke tre multaj membroj tiamaniere helpas al Esperantistoj, kiuj mem ne povus resti kiel membroj pro kaŭzoj ekster ilia povo.

Restas ankoraŭ unu punkto, kiu validas por preskaŭ ĉiu membro. Tute certe la granda plimulto ne rimarkis, ke ekster kurzaĵ ŝanĝoj, niaj kotizoj estas preskaŭ samaj kiel antaŭ dek jaroj, malgraŭ plialtiĝo ĉe la preskostoj je pli ol 100%. Pro tio la Komitato decidis ke plialtiĝo estas nepre necesa. Alie ni povus eldoni la gazeton nur ĉiudumonate. La plialtiĝo estas nur proksimume 25% kaj ni ne dubas, ke ĉiu membro konstatos la neceson por tiu ŝanĝo. La nova kotiztabelo troviĝas sur kovrilo 3 de ĉi tiu numero, kaj ni petas vin atenti tion kiam vi pagos vian kotizon. Por helpi al ni, kaj por ke vi mem ne spertu interrompon en la liverado de la gazeto (aŭ eĉ elĉerpiĝon!) bonvolu pagi ĝin kiel eble plej frue. Antaŭdankon.

C.C.G.

Hungara Ĉiusemajna Gazeto uzas Esperanton

Uj Magyarorszag (Nova Hungarujo) konata demokrata gazeto enkondukis Esperanto-rubrikon kun kurso. La celo estas kontaktigi la legantojn senpere kun alilandaj korespondantoj, por reciproka konigo de kultura, ekonomia kaj politika vivo. Oni skribu al la gazeto ĉe Zoltan-u.6,II, BUDAPEST V.

LA PETSKRIBO

Kiam ni komencis nian kampanjon ni antaŭvidis grandajn elspezojn, kaj konforme budĝetis. La kosto tamen atingis ciferon, kiu efektive estas konsiderinda. Tre multaj samideanoj ne povas aktive partopreni en la kampanjo, kaj ni atentigas, ke ĵen estas bela rimedo fari kontribuon kaj tiel doni konkretan esprimon al la deziro antaŭenigi nian aferon. La kosto de la kampanjo ĝis nun estas 450 pundoj; per malavaraj donacoj kaj konkurseto ni jam ricevis 132 pundojn; do restas saldo 318 pundoj, kiujn ni volonte vidus malkreski por ne tro ŝargi nian konton.

En Bern la komitato diskutis la aferon, kaj el ĉiuj anguloj oni emfazas la grandegan propagandan valoron de la Petskribo. Per ĝi la Esperantistoj povis objektivite veki la intereson de la publiko, kaj la konkretaj rezultoj en novaj samideanoj, en novaj kursoj, kaj en pli ĝenerala simpatio por nia afero estas netakseble gravaj.

Por daŭrigi tiun bonan laboron ni petas vian helpon pere de mondonacoj, kiujn ni danke kvitancos.

Nova decido de la Komitato traktas pri la kolekto de subskriboj. Ni daŭrigas la principon ke ĉiu folio portu nur unu subskribon, sed ni nun rajtas ricevi de Societoj, Institucioj, kaj Organizaĵoj ciferojn de kolektivaj subskriboj. Por ke la afero estu en ordo, ni proponas, ke ĉiuj tiaj kolektivoj portu la legitimon de la sekretario aŭ prezidanto de la koncernata organizaĵo. Ni devas esti certaj, ke la subskriboj efektive validas. Ni tre esperas, ke niaj kunlaborantoj scios bone ekspluati ĉi tiun novan rimedon de kolektado, kiu povos grandkvante kreskigi niajn ciferojn kaj samtempe doni al la afero karakteron pli oficialan.

Jen la ciferoj kontrolitaj ĝis la 9-a de Septembro:

Landoj

Nederlando ..	46843	Hungarujo ..	3589
Francujo ..	30928	Portugalujo ..	3423
Britujo ..	25244	Aŭstralio ..	3049
Ĉeĝoslovakujo ..	23287	Nov-Zelando ..	2495
Bulgarujo ..	21463	Egiptujo ..	1794
Svedujo ..	17755	Svisujo ..	1591
Germanujo ..	17540	Maroko ..	1037
Norvegujo ..	13750	Grekujo ..	810
Jugoslavujo ..	11740	Palestino ..	505
Danujo ..	9106	Irlando ..	463
Polujo ..	7898	Urugvajo ..	460
Aŭstrujo ..	7644	Kanado ..	334
Belgujo ..	6602	Hispanujo ..	276
Finnujo ..	6340	Hindujo ..	222
Usono ..	6252	Ceteraj lokoj ..	725
Argentino ..	6248		
Italujo ..	4464	sumo ..	292072
Brazilo ..	4130		
Islando ..	4065		

Okupoj

Artistoj ..	1745	Navigaciistoj ..	954
Delegitoj Komunumaj ..	432	Parlamentanoj ..	205
Dentistoj ..	465	Policistoj ..	1909
Desegnistoj ..	1887	Presistoj ..	2928
Dommastrinoj ..	40156	P.T.T.-istoj ..	6465
Edukaj Aŭtoritatuloj ..	1029	Religiistoj ..	1304
Elektristoj ..	2542	Sciencistoj ..	1059
Farmaciistoj ..	1078	Sindikataĉfoj ..	396
Farmistoj ..	9039	Soldatoj ..	2983
Hotelistoj ..	1475	Studentoj ..	27014
Inĝenieroj ..	12081	Ŝoforoj ..	2118
Intruistoj ..	16615	Ŝtatoficistoj ..	6766
Juristoj ..	1329	Tekstistoj ..	1274
Jurnalistoj ..	1008	Transportistoj ..	13438
Komercistoj ..	49943	Urboficistoj ..	3269
Konstruistoj ..	5618	Vendistoj ..	8415
Kuracistoj ..	3834	Vestistoj ..	5353
Laboristoj ..	19168	Diversaj ..	16276
Lingvistoj ..	278		
Metiistoj diversaj ..	20224	sumo ..	292072

UNESCO

Dum la kongreso en Bern la Komitato de U.E.A. pritraktis la raporton de S-ro E. D. Durrant, kiu havis la komision sekvi la evoluon pri la mondlingva demando ĉe UNESCO.

La pritrakto de la koncerna problemo evidente estis iom hazarda. Kvankam oni oficiale promesis al S-ro Durrant, ke fakuloj pri Esperanto estos demandataj pri tiu afero, oni en la mezo de Julio, sen kiu ajn avertito al ni, publikigis la decidon de iu subkomitato ke la Angla kaj Franca lingvoj estos la ĉefaj helplingvoj de la mondo, sed ke krome kiel duavicaj helplingvoj estos uzataj la Rusa, Hispana, Araba, Hindostana, Mandarena, Malaja kaj por Afriko diversaj lingvoj. Vere Salomona solvo!

Certe estas konsilinde, ke la Esperantistoj sendu al la lingva komitato de UNESCO leterojn en kiuj oni esprimas sian miron pri la farita decido. Oni samtempe faru demandojn pri la laboro de la organizaĵo. La leterojn oni verku en la propra nacia lingvo kun traduko en Esperanto. La oficistoj de UNESCO tiel vidos, ke Esperanto vivas kaj estas subtenata de personoj en la tuta mondo, kaj ke oni ne povas senĝene malatenti Esperanton. La adreso de UNESCO estas: 19 Avenue Kleber, PARIS 16, Francujo.

Kongreso de Normandiaj Esperantistoj

Samideanoj de la provinco Normandio en Francujo organizas la 30-an de Majo, 1948, ampleksan regionan kongreson en Fecamp, apud Le Havre. Oni atendas grandan ĉeston kaj invitas eksterlandajn Esperantistojn. Skribu al S-ro Delamore, 32 rue Alexandre-Legros, FECAMP (Seine Inf.).

TRA LA MONDO ESPERANTISTA

ĈEĤOSLOVAKUJO

La 9-an de Junio okazis en Prostějov granda festo en kiu gimnastikis 3,000 gestudentoj kaj kiun partoprenis 10,000 homoj. Partoprenis ankaŭ Sveda samideano S-ino A. Alamo, kiun oni sukcesis venigi antaŭ la mikrofonon por saluti la ĉeĥan junularon nome de la Sveda. S-ino Alamo parolis Svede kaj Esperante kaj oni faris tradukon, kiun oni akceptis per granda ovacio. S-ino Alamo krome povis paroli kun ĉeestanta ministro D-ro Hála, kiun ŝi konvinkis pri la utilo de Esperanto.

La sekvantan tagon oni invitis nian samideaninon fari prelegon antaŭ plena teatro. La propagando por Esperanto estis grandega kaj verŝajne trovos eĥon en la vintraj kursoj.

S. Jeřábek.

HUNGARUJO

Hungara Esperanto-Pedagogia Asocio raportas, ke dum la pasinta jaro oni instruis Esperanton en 10 lernejoj en Hungarujo, laŭ raportoj kiujn ĝi ricevis; sed atentigas ke verŝajne ne ĉiuj gvidantoj de oficialaj kursoj en lernejoj sin anoncis. Oni petas ke la instruistoj kiuj gvidas kursojn en lernejoj sin anoncu por ebligi statistikon. Estus bone se la internacia instanco IIK povus ricevi detalan statistikon el ĉiu lando por kompili fidindan informaron.

GERMANUJO

Kun la espero povi presigi Esperanto-organon Germanaj Esperantistoj petas pri alsendo de ĉiujpecaj paperoj, malnovaj ĵurnaloj, dokumentoj kaj simile. Oni tamen kontrolu en la respektivaj landoj pri la pezlimo de pakajoj. Ĉion sendu al D-ro S. Ziegler, (13b) München-Pasing, Engelbertstr. 7.

La kongreso de la Socialdemokrata Partio de Germanujo (S.P.D.) la 29-an de Junio ĝis 2-a de Julio, akceptis rezolucion favoran al Esperanto. La partio akcelos la enkondukon de Esperanto inter la laboristaro kaj ĝian uzadon en la internacia korespondado kun alilandaj laborist-organizaĵoj. La partio rekomendas plivastigi la uzadon de Esperanto ĉe internaciaj laboristaj kaj sindikataj kongresoj.

Averto

Samlingvano en Alt-Erlangen, Germanujo, senhonte misuzas nian lingvon por grandskale almozpeti ĉe multege da eksterlandaj organizaĵoj.

Ni deziras averti I.E.L.-U.E.A.-anojn ne sendi kion ajn al ĉi tiu homo, kiu per sia agado malbonfamigas nian movadon. Se oni volas sendi manĝaĵojn aŭ vestojn al Germanaj

samideanoj, oni sendu ilin al la Centro de G.E.A. De tie oni povas disdoni al la plej malfeliĉaj kaj tro modestaj.

Germana Esperanto-Asocio.

ITALUJO

En la unuaj tagoj de Aŭgusto okazis en Torino la unua postmilita kongreso. En la Palaco Carignano kunvenis pli ol 150 samideanoj, inter kiuj sin trovis kelkaj alilandanoj.

La ĉefa celo de la kunsidoj estis reorganizo de la Itala movado, kaj pri tio oni formis bonan bazon de estonta agado.

La kongreso altiris multan atenton kaj la tri plej gravaj ĵurnaloj de Torino donis raportojn pri la okazaĵoj.

J. Scalenghe.

Nia nelacigebla pioniro Pastro Modesto CAROLFI finis kurson donita al instruistinoj en *Forlì* dum la pasintaj monatoj. Krom tiuj montrataj en tiu ĉi bildo aliaj ok instruistinoj kaj kelkaj monaĥinoj partoprenis la kurson.



Franciskano-pastro Modesto Carolfi, D de UEA en Forlì kun siaj lernantinoj.

DANUJO

Danaj Someraj Kursoj

Sekve de tio, ke tre multaj samideanoj vizitis la eksterlandon, la nombro de partoprenantoj ne estis tiel granda kiel antaŭe. Ĉeestis tamen samideanoj el 6 landoj. La kursoj okazis denove en la Internacia Altlernejo de Elsinoro kaj verŝajne ĝi estos disponebla ankaŭ en la venonta jaro por la sama celo.

Pluraj partoprenantoj de la S.A.T.-kongreso ĉeestis dum la Hadstenaj kursoj, kaj unu eksterlandano deklaris, ke li multe preferas tiujn gajaĵn popularajn kursojn, ol kongreson.

C. Major.

Internacia Renkontiĝo en Angers

De la 13-a ĝis 22-a de Julio, okazis en Angers, Francujo, internacia renkontiĝo, kiu bone sukcesis. Malgraŭ nuntempaj malfacilaĵoj, proksimume 70 samideanoj el Francujo, Britujo, Nederlando, Danujo, Svedujo kaj Maroko vizitis Angers.

Okazis ĉiutage promenadoj kaj ekskursetoj, kaj grupo de instruistoj organizis interesajn paroladojn kaj diskutojn pri diversaj temoj.



La urba estraro oficiale akceptis la ĉeestantojn kaj honore al ili proponis vingustumadon.

La grupo organizis varietean vesperon kaj eldonis Esperantlingvan gvidilon pri la urbo.

A.F.

T.J.O.—Tendaro en Ipswich, Anglujo

La 3-a Internacia Tendaro de T.J.O. okazis en Ipswich de la 14-a ĝis la 21-a de Aŭgusto. Ĉeestis pli ol 200 el 9 landoj. Kun afabla permeso de la Loka Komitato por Eduko oni povis uzi modernan ternejon por la kunveno, kaj tuj post oficiala akcepto fare de la Urbestro, oni komencis la programon.

Aparte ŝatataj estis tuttaga ekskurso per aŭtobusoj ĝis Londono kaj ekskurso sur la erikejo Foxhall. Atentinda estis Diservo en la dimanĉo, en kiu predikis S-ro F. D. Murphy. Inter la vesperaj distraĵoj oni devas menci la bonegan demonstracion de popoldanco kiun prezentis la Ipswich'a G.F.S. (Porknabina Amikeca Societo), kaj ĥorkantado de Ipswich'a Kooperativa Junulara Ĥoro.

Malgraŭ tio, ke S-ro Rheinhard Uhde, la Germana ĉefperanto, ne povis ĉeesti pro deviz-malfacilaĵoj, tiu lando estis reprezentata de S-ro Rudolf Hohitz, malnova Esperantisto nun en apuda militkaptitejo. Vizitis nin S-ro Theo Krik (Jugoslavujo) ankaŭ en militkaptitejo.

La afero estis granda sukceso kaj ĉio pasis en plena harmonio. Oni plezure bonvenigis S-ron Robert Robertson, prezidanton de Denaska Esperantistaro en la laborkunsido, kie inter aliaj aferoj, oni decidis okazigi la venontjaran tendaron en norda Francujo.

Granda estis la propaganda valoro de la kunveno. La Urbestro kaj Prezidanto de la Komitato por Eduko ĉeestis dum kelkaj vesperoj kaj treege interesiĝis pri nia afero. Oni jam aranĝis novajn kursojn en la urbo. Dum la semajno, geknaboj postkuris la organizintojn kriante, "Kie ni povos lerni Esperanton?" kaj jam nun oni aŭdas "Kiam mi iros al la T.J.O. Tendaro venontan jaron . . . !"



Inter la ĉeestantoj oni povas vidi la Prezidanton de T.J.O., S-ro Pieter Krijt (Nederlando) sidanta maldekstre de la unua vico; S-ron Jack Heath (organizanton) kaj S-ron F. Parker kune side 3 kaj 4 de la dekstra flanko de la sama vico. S-ro R. Robertson sidas kun blanka ĉapelo sur la genuoj. Dekstre de la dua vico staras F-ino Nellie Rees (malhela robo) la Angla ĉefperanto, S-ino Parker kaj F-ino R. J. Rees.

J.H.

Esperanto kaj Komercio

S-ro R. Levin, nova ĝenerala sekretario de la asocio *Esperanto kaj Komercio* proponas ke tiu asocio fariĝu internacia.

Ĝi kompreneble intime kunlaboros kun U.E.A. kaj landaj asocioj.

Prepara renkontiĝo okazos ĉe la Foiro de Lyon en Aprilo 1948. Interesataj komercistoj estas invitataj sin anonci al Richard Levin, Fakestro pri Propagando, Foire de Lyon, rue Ménestrier, LYON, Francujo.

Stratnomigo en Wrzeszcz

Dum la Gdanska Foiro, oni nomis straton en Wrzeszcz honore al la memoro de D-ro Zamenhof. La poŝtaŭtoritato krome festis la Esperanto-Tagon per speciala Esperantlingva mulgilo.

E.K.

TRA LA LIBRARO

* = akireblaj ĉe I.E.L.



***Arboj de la Arbaro kaj Kampo:** de Frank Booth. Trad. el Angla lingvo: 38 p. broŝ. poŝformata. Eld. The Esperanto Publishing Company Ltd.; prezo 1 ŝil. 9 p.

Ĉi tiu nova verko estas eksterordinara pro pluraj kaŭzoj. La nekonata tradukinto per modela lingvo malfermas al ni tute novan terenon. Iom nefacile estas precize difini la kategorion al kiu ĝi apartenas, ĉar malgraŭ tio, ke la verko estas scienca, la multaj faktoj pri la vivo de arboj, pri iliaj karakterizaĵoj, pri la floroj kaj fruktoj, eĉ pri la superstiĉoj kiuj ekzistas pri ili, la prezento estas tiel alloga kaj interesena, ke la etikedo *scienca* eĉ ne iomete priskribas ĝin.

La arboj ĉiuj troviĝas en Anglujo, sed ankaŭ estas troveblaj en grandaj nombroj tra Eŭropo, kaj la allogo de la temo devas esti universala. Ĝi precipe celas tiujn homojn kiuj amas la arbaron kaj la arbaran medion, kiuj volonte vivas—eĉ se nur mallongatempe—en intima kontakto kun arboj.

La ilustraĵoj devas esti inter la plej belaj en la Esperanta literaturo. Kiu kredas, ke nur la vesto de arbo faras ĝin bela, ke nur en la foliara sezono ĝi havas allogon, tiu rigardu kaj rerigardu la *nudaĵojn* ĉi tie prezentitajn kaj malkovru novan fonton de ravo en la naturo.

Tre modesta estas la verko, oni povus diri eĉ tro modesta, ĉar da tiaj verkoj ni havas ne sufiĉe en nia internacia literaturo. La preso kaj papero estas laŭ la kutime alta nivelo de ĉi tiu eldonejo. Senrezerve rekomendinda.

M.S.

***Du Amosentaj Noveloj:** *Imenlago* de Theodor Storm; *Maruŝka* de Mela Escherich. El la germana tradukis A. Bader. 44 paĝoj, 16×23. Svisa Esperanto-Societo, 1947. Broŝ. 2ŝ. 9p., afranko 2p.

Tri noveloj de la Germana verkisto Theodor Storm (1817–1888) estas tradukitaj en Esperanton kaj eldonitaj en libroformo. Du, *La Blankĉevala Rajdanto* kaj *Violo Trikolora*, aperis en 1929 el la eldonejo de *Heroldo de Esperanto* sub la titolo *Du Majstro-Noveloj* kaj estas ankoraŭ aĉeteblaj.

*La tria *Imenlago* formis parton de la *Kolekto de la Revuo*, kiun la Pariza librejo Hachette eldonis antaŭ la unua mondmilito. Ĝi antaŭlonge elĉerpiĝis. Nun ĝi reaperas kiel eldono de la Svisa Esperanto-Societo.

S-ano Alfred Bader reviziis sian tradukon de antaŭ kvardek jaroj, sed ĉu la ŝanĝoj estas ĉiam plibonigoj estas afero de gusto. Ĉu, ekzemple *tra la fenestrajn vitrojn* estas preferinda al *tra la fenestraj vitroj*, aŭ al *la akvo* pli bona ol *al la akvo*?

Unu-du eraretoj restas; *brulanta kristnaskarbo* (iom danĝera en domo, ĉu ne?), *desuprenpendantaj bukloj* kaj misuzo de *devas* anst. *povas* en la frazo *Ĉu mi devas vin helpi*? Sed ili estas bagateloj.

Pri la rakonto mem oni facile povus moki. Ĝi havas tiun nuancon de melankolio kaj sinkompato, kiun oni prave-malprave opinias distingaĵo de la Germanaj literaturo kaj karaktero. La heroo, kiam juna, preferis siajn studojn al sia amatino, kaj perdis ŝin—juste laŭ mia opinio, ĉar li skribis eĉ ne unu leteron al ŝi dum du jaroj da foresto en universitato! Lia amo por ŝi estis certe pli *amosenta* ol pasia.

La alia novelo en la libro, *Maruŝka*, de la malpli konata Mela Escherich, traktas pri tute mala speco de amo. La heroino tiel pasie enamiĝas, ke ŝi oferas la vivon por viro, kiun ŝi konis nur du horojn! *Maruŝka* estas tro romantika por esti kredibla. Sed *Imenlago* estas tre lerte kaj bele verkita. Legante oni preskaŭ kredas la rakonton, kaj nur poste oni konstatas, kia stultulo estis la heroo.

Ĝenerale pri la gramatiko kaj stilo de ambaŭ tradukoj oni ne rajtas plendi. La preso estas bonega. Nur du preserarojn mi rimarkis—*antaŭ* p.30 kaj *sursurantaj* p.40.

E. P. Ockey.

Vijf Kunsttalen: vergelijkend onderzoek naar de waarde van het Volapük, Esperanto, Ido, Occidental en Novial: de W. J. A. Manders: eld. J. Muusses, Purmerend, 1947.

Bonvena signo de la serioza intereso, kiun oni en akademijaj rondoj jam montras por la problemoj de internacia lingvo, estas ĉi tiu doktora disertacio. La verkisto prezentis ĝin en Aprilo 1947 kaj akiris per ĝi la bone merititan promocion al la doktorgrado. Kiel la titolo diras, temas pri kompara esploro rilate al la valoro de la kvin plej gravaj *artefaritaj* (konstruitaj) lingvoj.

Enkondukaj ĉapitroj pritraktas resume kaj precize la ekzistantajn naturlingvojn, iliajn disvastiĝon kaj familiarajn parencecojn, poste la tiel nomitajn *lingua francas* aŭ trafiklingvojn kaj fine sekret- aŭ kaŝlingvojn. Sekvas diskuto pri la celoj kaj specifaj taskoj plenumotaj de konstruita lingvo kaj adekvata historio de la kvin movadoj menciitaj.

La tria ĉapitro esploras zorge kaj detale la diversajn trajtojn kaj strukturojn de la kvin internaciaj lingvoj, laŭsisteme irante de la ortografio kaj fonetiko al la vortfarado kaj

ortografio de ĉiu. La verko finiĝas per mallonga raporto pri la laboroj de I.A.L.A. La verkinto konas la projektojn ĝisfunde. Li metas en ĝustan perspektivon la pretendojn de la *naturemuloj* kies modelo estas Occidental, kaj la *planemuloj* kies modelo estas Esperanto. El lia profunda sperto de Esperanto li faras—kaj rajtas fari—kelkajn pripensindajn kritikojn, kiuj tamen ne igas lin maljusta al ĝiaj meritoj. Por ni estas aparte valora lia rimarkinda kolekto de eraroj fakte faritaj de Esperantistoj diversnaciaj. La vidpunkto similas al tiu de profesoro Björn Collinder, kiu objekte konstatinte la makuletojn tamen taksas Esperanton kapabla plenumi sian gravan rolon. Ni gratulas kaj D-ron Manders kaj la Universitaton de Utrecht pro ĉi tiu valora disertacio.

Prof. W. E. Collinson.

***Ĉe la Sanktaj Akvoj :** de J. C. Heer : ' el la Germana trad. A. Bader, P. le Brun, J. Schmid. Unua parto : 84 p. 16 × 23 cm. Svisa Esperanto-Societo, Bern 1947. Broŝ. 4s., afr. 3p.

Por Esperantisto en Britujo, kie oni de pli ol sep jaroj devas observi kaj toleri la promilitan ŝparemon rilate al la papero, estis granda plezuro havi inter la manoj ĉi tiun plaĉaspektan volumon, kun bonkvalita papero kaj larĝaj marginoj, kun bela tipografiaĵo kaj kun frapanta kovril-fotografiaĵo.

La aŭtoro, Jakob Christoph Heer (1859–1925) estis tre eminenta Germansvisa literaturisto, kaj ĉi tiu verko, aperinta unue en la jaro 1898, estas unu el liaj plej famaj romanoj. En ĝi li rakontas la legendecan historion pri la grandaj akvo-kondukiloj en iu regiono de la Svisa alparo, kiuj estas alfiksitaj al la krutaĵoj kaj kiuj servas por irigacii la vinberejojn sur la montdeklivoj. Oni legas interalie tre interesajn priskribojn pri la naturaj belaj kaj la popolaj kutimoj de la regiono, pri la intrigoj inter la kamparanoj, pri ilia malamo al la fremdurbanoj, kiuj venas en ilian vilaĝon por libertempi, pri iliaj superstiĉemo kaj religiemo, kaj entute pri ĉiaj facetoj de la montara vivado. Inter la personoj, kiuj ludas gravajn rolojn en la romano, elstaras Peter Valdiŝ, prezidanto de la komunumo kaj samtempe trinkejmastero, poŝtestro, komerca peranto kaj monpruntisto, kaj Fränzi, materie malriĉa, sed spirite riĉa edzino de la sovaĝherba falĉisto Seppi Blatter.

La traduko estas generale flua kaj bonstila ; nur en kelkaj lokoj oni renkontas la malagrablajn longajn parentezojn, kiujn la Germana lingvo permesas meti inter artikolo kaj ties substantivo, sed kiuj devus tute ne reaperi en Esperanta traduko. Estas nekutime kaj evitinde uzi la eliziitan formon *de l'* en proza verko. Jen kaj

jen ekzistas ia neprecizeco pri la tempoformoj de la verboj ; oni legas ekzemple *-is* anstataŭ *-us* (p. 11), *-us* anst. *-os* (p. 28, 62) kaj *-is* anstataŭ *-as* (p. 70). *Spite ĉio* (p. 64, 77) estas eksterdube erara el gramatika vidpunkto, ĉar *spite* estas adverbo, ne prepozicio, kaj tial devus sekvigi akuzativon ; cetera estas verŝajne, ke oni pli ĝuste skribus *malgraŭ ĉio* en ambaŭ okazoj.

Oni povas sincere rekomendi ĉi tiun libron ; estas antaŭvideble, ke multaj legantoj atendos senpaciencie la eldonon de la dua parto, kiun la eldonistoj promesas aperigi antaŭ la fino de la nuna jaro.

Alec Venture.

Ricevitaj :

Kanto de l' Esperanta Festo kaj Nun Venu al Verdstandard' ; N-ro 2 de la serio *El Ĉina Muziko*. Havebla ĉe Eltunko, P.O. Box 115, CHENG TU, Ĉinujo. Prezo nemontrita.

Album of Great, Outstanding and Eminent Personalities of Russia (Albumo de grandaj, elstaraj kaj eminentaj personoj de Rusujo) ; redaktis Anglalingve Pastro I. Serišev en Sydney, Aŭstralio. Enhavas mallongan biografeton de L. L. Zamenhof, kaj fotografiaĵoj de Devjatnina kaj Ivan Ŝirjaev, konataj pioniroj de Esperanto.

Bele produktita *Skolta Bulteno* de Egiptujo enhavas longan artikolon, kun fotografiaĵoj, de Mohamed Ali Cherif, U.E.A. Delegito en Kafr el Dawar.

PENSEROJ

De JOSÉ MARTÍ, 1853–1895

(Kubana verkisto, apostolo de la sendependeco de Kubo)

Kiam ni vivadas por la homoj, kiu povas igi nin malbonaj aŭ malami nin ?

Agas malbone tiu, kiu havante sufiĉan forton por servi la homaron, ne faras tion.

Ne povas esti feliĉa, kaj ne meritas ĝin esti, tiu kiu ne kontribuas al la feliĉo de la homoj.

Esti utila estas pli bone ol esti princo.

Ne meritas esti servata de la homoj tiu, kiu ne servas la homojn.

Por ĉiuj suferadoj, la amikeco estas efika kuracilo.

Ne nomu vin homo se vi ne helpas la homojn.

Instrui estas la plej bela kaj honoriga tasko en la mondo.

Krom la amo de virino, nenio pli bela ol la amikeco.

El la hispana tradukis :
Hilario Zayas, Manzanillo.

POSTMORGAŬ

Profesoro Jaloux elrigardis el la fenestro de ĝardena pavilono, kiu servis al li kiel laboratorio. Trokreske florhavaj rozuoj puŝis sin volverampe en fenestrojn, preskaŭ kovrante ilin kaj la pordon, kvazaŭ ili volus kaŝi de la mondo la suferadon de la kreaĵoj, kiuj tie suferadas kaj mortadas en la servo de la scienco.

Akvo en la sterilizaparato bolis. La profesoro levis la kovrilon de vazo, elprenis el ĝi injektilon, prenis el kovilo boteleton, plenigis la injektilon kaj paŝis al kaĝo, kie tri simioj senzorge krakmordetis nuksojn. Li lertamove eltiris unu simion post la alia kaj injektis sub la haŭton al ĉiu duonon de kuba centimetro da fluído.

Li poste notis en sian taglibron :

“La 15-an de majo, je la kvina posttagmeze. Al tri simioj mi injektis po duono de kuba centimetro da substanco ; tio estas proksimume 25,000 da nove aperigitaj generantaj ĝermoj. Mi atendas la unuan simplan simptomon post dudek kvar horoj, kaj la morton plej malfrue en la sekvontaj dudek kvar horoj.”

Poste, li sekigis la skribaĵon per inksorbilo kaj turnis sin. Ĉe la pordo staris viro. Kiam la viro eniris la ĉambron li ektuŝis branĉeton de la volviganta rozujo. Jam sur lia vango defluadis guto de sango el la vundeto, kiun faris la rozdorno. Profesoro Jaloux neniam montris, ke li ektimas. Lia vizaĝo, kvazaŭ ŝtona, eĉ ne ekmovigis. La okuloj, malantaŭ okulvitroj, nur rigardis eble ankoraŭ pli malvarme.

“Dek du jaroj” diris la alveninto, Eduardo Gemier, dum li devis la sangon de la vango per poŝtuko, “estas tempo sufiĉe longa por povi per forgeso enterigi la malamikecon. Ĉu vi ne opinias, ke jes, Pierre ?” Li rigardis la scienciston, kun la nekontraŭstarebla rideto, al kiu ĉiu ĝis nun submetiĝis kaj kiu faris la iaman provincan oficiston milionulo.

Profesoro Jaloux ekstaris. “Jes, dek du jaroj estas longa tempo. Kaj multo okazis dum tiu tempo.” Li etendis la manon al la vizitanto, kaj Eduardo varme premis. “Sidigu. Kiel vi venis ĉi tien ?”

“Mi estas survoje al Marseilles. Mi devis interrompi la vojaĝon por iom ripozi. Ni havis kun amiko veljahton per kiu ni volas entrepreni ŝipveturadon tra Mediteraneo. Mi ne povis rezisti la tenton viziti vin, por . . . nu, vi ja scias pri kio mi pensas.”

Li ĉirkaŭrigardis en la laboratorio kaj daŭrigis : “Do, ĉi tie vi faras la malkovrojn, kiuj skuegas la mondon ; de ĉi tie disvastiĝas via famo, kaj,

kiel oni ĝenerale asertas, ĝi baldaŭ havigos al vi la premion de Nobel.”

Eduardo pensis pri la sensacio, kiun li kaŭzos per la rakontado, ke li estis en la laborejo de la fama biologo, kiu vivis kiel ermito kaj nenium enlasis al si. “Jaloux estas mia delongtempa amiko”—li diros indifere—“ni devenas de la sama komunumo. Li estis la unua edzo de mia edzino.” Tio certe impresigos la societemajn filistrojn.

“Ĉu Clarisse estas kun vi ĉi tie ?” demandis Jaloux.

“Ne, ŝi restis en Parizo. Vi ja scias, ke ŝi ne ŝatas primitivajn amuzojn.” Kiel trankvile kaj indifere Pierre parolas pri Clarisse ! Jes, la tempo ĉion forviŝas kaj resanigas ! Tiel pensis Edouard, kaj laŭte aldonis : “Kaj kiel progresas via scienco ? Ĉu jam estas trovita la nova infekta ĝermo ? Kaj ĉu ĝi estas mortiga ?”

La profesoro indikis la tri simiojn. “Jus antaŭ ol vi venis ili ricevis po injekto. Postmorgaŭ vespere ili estos mortintaj.”

Eduard ekstaris kaj iris al la kaĝo. “Ĉu ili pereos ? Ĉu ili mortos ?” li demandis mirigite. “Tio estas nekredebla. Kaj ili aspektas tiel freŝaj kaj gajaj. Ĉu oni ne povas helpi ilin ?”

La sciencisto nee skuis la kapon. “Nenio povas savi ilin.”

Eduardo denove mallevigis en apogseĝon kaj parolis. “Kiel stranga estas la vivo ! Ni sidas ĉi tie kune kaj parolas kvazaŭ ni estus disirintaj hieraŭ kaj ne antaŭ dek du jaroj. Kaj la vivo daŭre pasas. Ni ambaŭ, sen trograndigo, povas diri ke ni kreis historion. Kaj ŝajnas al mi, ke estis nur hieraŭ, ke mi sidis en malgranda banko super kontolibroj kaj vi venis de akuŝo de iu malriĉa kamparistino.” Momenton li eksilentis kaj rigardis antaŭ sin. “Kaj povas esti, ke vi ankoraŭ hodiaŭ estus sensignifa provinca kuracisto,” li aldonis kun sia nokontraŭstarebla rideto, “se mi tiam ne estus kaŭzinta al vi tiun grandan doloron, kiu malhelpis vian mezkvalitan vivon kaj faris vin fama sciencisto. Se mi ĉion ĉi pripensas, venas al mi la penso, ke oni devus atribui la premion de Nobel al mi, sed ne al vi.”

Ŝajnis, ke Profesoro Jaloux ne aŭskultas. Antaŭ lia interna vido ekaperis malnova bildo : Clarisse, kiun li amis kaj adoris, en brakoj de la amiko al kiu li fidis. Tiam Clarisse diris, “Nun vi scias tion, kaj mi ĝojas pri tio. Mi foriros kun li. Mi ja satuzis vin kaj tiun senkonsolan vivon sen estonteco. Eduardo havas karieron antaŭ si, li estos milionulo. Sed vi, vi restos dum via tuta vivo provinca kuracisto”.

UZADO DE FAMILIAJ NOMOJ ĈE HISPANE PAROLANTAJ POPOLOJ

Ĉar en la plimulto de la Eŭropaj landoj oni kutime uzas nur unu familian nomon, kaj tiu estas ĉiam la lasta el ĉiuj nomoj uzataj de ajna persono, oni inklinas apliki tiun principon al familiaj nomoj de Hispane parolantaj popoloj. Tion kaŭzas nescio pri la Hispana uzado de familiaj nomoj. Jen do mallonga klarigo, kiu espereble donos al la tutmonda samideanaro klaran komprenon pri ĝusta klasigo de Hispanaj kaj Sudamerikaj nomoj, kaj kiu evitigos tiom da miskriboj, kiel nun okazas.

Ĉiu Hispano (aŭ Amerikano de popolo Hispane parolanta) laŭleĝe kaj teorie havas du familiajn nomojn: unu de la patro kaj unu de la patrino. La ĉefa familia nomo estas la unua el la du. Tial Johano Pérez Sánchez estas S-ro Pérez Sánchez, Johano; aŭ simple S-ro Pérez, neniam S-ro Sánchez. Heredo de familiaj nomoj, kiu estas deviga kaj ne eksigebla, okazas laŭ jena plano:—

(A)	(B)	(C)	(D)
Paŭlo Pérez Fernandez	Johano Pérez López	Paŭlo Pérez Díaz	Johano Pérez Sánchez
Delia López Márquez	Sara Díaz Hernández	Marta Sánchez Gómez	
Mateo Díaz Vázquez	Petro Sánchez González		
Diana Hernández Jiménez	Maria Gómez Benítez		
Alberto Sánchez Déniz			
Eva González Rodríguez			
Jakobo Gómez Dumpiérrez			
Margarita Benítez Chávez			

Noto: (A)=edzparoj; (B) gefiloj respektive de (A); respektive de (B); (D) filo de (C) do la pranepo de (A).

Ĉe edziniĝo, sinjorino ricevas post sia ĉefa—unua—familia nomo la ĉefan familian nomon de sia edzo, kaj antaŭmetas la vorton *de*. Do, se Fraŭlino Sara Díaz Hernández edziniĝas al Sinjoro Johano Pérez López, la nova sinjorino—nomo estas Sara Díaz de Pérez. Tiel, en Hispanujo, la edzinoj konservas sian ĉefan—patran—familian nomon. En la mondumo oni kutime diras *S-ino de Pérez*, *S-ino de Sánchez*, ĉiam kun la vorto *de*, ĉar sen ĝi la nomado estus miskompreniga.

Ĉe vidviniĝo, sinjorino konservas sian edzinan nomon, sed la vorton *de* anstataŭas la formulo *viuda de* (=vidvino de; mallongige, *Vda. de*); do, *Sara Díaz Vda. de Pérez*. Ĉe denova edziniĝo, ŝi kompreneble alprenas la novan edzo—ĉefnomon.

Generale tamen, kiam temas pri diplomoj, atestoj, civilaj dokumentoj liveritaj de aŭtoritatoj

k.t.p., virino uzas nur siajn heredajn familiajn nomojn, ĉu ŝi estas fraŭlino, sinjorino aŭ vidvino.

Kompreneble, ne ĉiam estas tiel klara la uzado de la nomoj. Multaj uzas tre komplikajn kunmetitajn familinomojn. Tiel estas, ekzemple, ĉe *S-ro Ludoviko Gutiérrez de Vázquez y Gelmírez Deminguez de Salazar y Hoyo-Solórzano*, kiu ĉenigis al si la plenajn gepatrajn nomojn, siavice jam kunmetitajn. (La ekzemplo estas reala; mi ŝanĝis nur la antaŭnomon kaj unu el la familiaj por ke, se ties posedanto legos mian artikolon, li ne koleros, kaj akuzos, ke mi ekzempligas per li.) Sed tio okazas ĉefe inter nobeloj, kiuj fieras pri historie famaj familinomoj. Tiu uzado, pri kiu, cetere, estas necesa oficiala registara permeso, jam apenaŭ viglas.

Ĉies rajto tamen estas, laŭvola uzado de la vorteto *y* inter gepatraj familinomoj. Tiu uzo ekestiĝis kiam temis pri laŭleĝaj gefiloj. Y estas egala al la Esperanta *kaj*, kaj oni interpretis la

nomojn jene: *Johano Hernández y González* signifus *Johanon* (filon de S-ro) *Hernández* kaj (de S-ino) *González*; familiaj nomoj sen *y* taŭgus por sengepatraj aŭ nelaŭleĝe naskitaj homoj.

Ĉu prave, ĉu ne, hodiaŭ tiu kutimo estas malaperinta, kaj ĉiu povas laŭplaĉe meti aŭ nemeti la vorton *y* inter siajn familiajn nomojn. Tion faras multaj, kaj pluraj Hispanaj famuloj tiel nomiĝas; *José Ortega y Gasset*, *Marcelino Menéndez y Pelayo*, *José Ossorio y Gallardo*, k.t.p. Tamen, *Benito Pérez Galdos*, *Wenceslao Fernández Flórez*, *Ramón Menéndez Pidal* k.t.p. ne ŝatis la *y*-uzon.

Ĥaose estis antaŭ tiu ordigo. Ĝis la dekoka jarcento ĉiu povis laŭvole uzadi la familiajn nomojn, kiujn li preferis. Tial, dum legado de malnovaj dokumentoj, oni ofte trovas, ke pluraj gefratoj havas tre malsimilajn nomojn familiajn.

Oni adoptadis tiujn de geonkloj, de baptopatroj, de famaj flank-prauloj k.t.p. De la deknaŭa jarcento datas la nuna ordo.

Ĉerpante nomojn por la prihereda supra plano, mi intence elektis z-finajn familiajn nomojn, kiuj estas la plej abundaj en Hispanujo. Tiu z ŝajne signifas *ido*, ĉar de la antaŭnomo *Rodrigo* deriviĝas *Rodríguez*; de *Lope*, *López*; de *Martín*, *Martínez* k.t.p. Sed kiel estiĝis en la historio de la Hispana lingvo tiu z, tio estas problemo pri kiu la Hispanaj lingvistoj ankoraŭ ne interkonsentis. Familiaj nomoj cetere povas havi ajnan leteron finaje: *Ayala*, *Doreste*, *Toranza*, *Alberú*, *Valcárcel*, *Quintín*, *Salazar*, *Armas*, *Rey* k.t.p.

Ĉion gravan por kompreno de familiaj nomoj ĉe Hispane parolantaj popoloj mi kredas esti dirinta.

*J. Régulo Pérez,
Kanariaj Insuloj*

Postmorgaŭ—*fino*

Ĉu Eduardo sentis pri kio Jaloux meditas? "Pierre, mi neniam konsciis tion, ke mi faris maljustaĵon al vi. Tial mi ne petis de vi pardonon. Kontraŭe, mi opinias, ke mi faris vin fama." La profesoro fikse ekrigardis sian estintan amikon, kiu deŝiris de sia vango sekigintan sangon tiel, ke la vundeto denove sangadas. "Alie, vi helpus ĝis nun al kampanarinoj en krizaj horoj de ilia vivo, kaj kuracus gripon."

"Tio jam ne estas vero, kion ni tiam faris kiam ni estis junaj kaj malprudentaj."

"Jes. Hodiaŭ ni estas viroj, maturaj kaj prudentaj. Mi estas kontenta, ke vi komprenas tion. Espereble vi vizitos min kaj—Clarisse, se vi iam venos al Parizo. Mi tamen devas nun foriri. Mia amiko certe estas malpacienca."

"Atendu momenton," diris la profesoro, kaj prenante peceton de vato, li malfermis la kovilon, gutigis ian fluidaĵon sur la vaton, kaj sin turninte al Eduardo, ekŝmiris la gratvunditan lokon sur lia vango per la malsekigita vato. "Nun ĝi jam ne sangos."

"Do, ĝis revido," diris Eduardo, "kaj ni esperu baldaŭ . . . Eble en Stockholm, ĉu ne?"

"Kiu scias? Cetere, kie vi estos postmorgaŭ?"

"Malproksime sur vasta maro. Estu sana!"

"Adiaŭ!" Profesoro Jaloux rigardis post li dum li malproksimiĝis tra la ĝardeno, eniris la atendantan aŭtomobilon kaj forveturis. Poste li sin turnis al la kaĝo kaj observis enpenisige la simiojn, kiuj ĝoje kaj senzorge krakmordetis nuksojn. Jes . . . postmorgaŭ?

Tradukis F. Petřík, Ĉeĥoslovakujo

ESPERANTO EN RADIO

Redaktas S-ro A. C. Oliver, 57 Woodland Road, Maple Cross, Rickmansworth, Anglujo, al kiu oni sendu senescepte ĉion pri ĉi tiu rubriko

Mallongigoj : I=Informoj, P=Parolado, K=Kurso

Ĉintage	16.30–16.45	Praha. 1935m. kaj 25.34m. I.
	22.00–22.15	Praha. 31.41m. P.
Lundo	11.30–11.40	PRG2 (Brazilo). 104m. P.
	20.50–21.00	Praha. 470.2m. Prelegoj, intervjuaĵoj, teatraĵoj, scenetoj, kantoj kaj informoj. Radiostacio, Stalinova 12, Praha XII.
	22.30–22.35	Budapest I. 549.5m. I. Hungara Radio, Budapest VIII, Bródy Sándor u. 7.
Mardo	17.45–17.50	Bern. 31.46m. kaj 48.66m. P. de D-ro Baur. Schweizer Kurzwellendienst, Postfach Transit, Bern.
	18.50–19.00	Sofia. 32.9m. P. Radio Sofia.
	21.45–22.00	Hradec Králové. 238m. (Krom la unua mardo).
	22.00–22.10	Ostrava. 259m. Radiostacio, Ostrava, Bráfova 5.
Merkredo	5.35–5.45	Wien I. 506.8m. K. RAVAG-Wien, 30a Argentinierstr., Wien IV.
	10.15–10.35	Paris. 431.7m. K.
	21.10–21.25	Warszawa III. 49.06m. I. Pola Radio, Warszawa, Koszekowa 8.
	22.30–22.35	Budapest I (kiel je lundo).
Ĵaŭdo	16.50–16.55	Wien II. 31m., 41m. kaj 228.6m. I. RAVAG-Wien.
	17.45	Bern. 31.46m. kaj 48.66m. P. de D-ro Privat.
	18.45–19.00	Hradec Králové. 280m. Vychod-očeky vysílá, Hradec Králové, Ĉeĥoslovakujo.
	21.50–22.00	Praha. 470.2m. (kiel je lundo).
Vendredo	22.00–22.10	Ostrava. 259m.
	18.50–19.00	Sofia. 32.9m. P. Radio Sofia.
Sabato	22.30–22.35	Budapest I (kiel je lundo).
	19.00–19.45(?)	PRA2 (Brazilo). P. Ministerio por Edukado kaj Saneco, Praca da República, Rio de Janeiro.
	20.00–20.30	PRI 3 (Brazilo). 49.75m. P. "Brazila Kroniko", Radio Inconfidência, Belo Horizonte, Minas Gerais.

Klarigoj—En la tabelo la horoj de la dissendoj estas laŭ la horszistemo de Greenwich, sed demanda signo signifas ke ni ne havas precizan informon pri la horszistemo. Por Mez-Eŭropa tempo oni aldonu unu horon. Ni petas informon pri necesaj aligoj. La donitaj adresoj estas tiuj al kiuj oni sendu gratulleterojn kaj informojn pri ricevo.

Praha—La ondo 25.34m. estas aŭdebla ankaŭ en transmaraj landoj. Samideanoj en tiuj landoj bonvolu aŭskulti kaj raporti al Praha.

UNIVERSALA ESPERANTO-ASOCIO

Centra Oficejo : Herongate, Rickmansworth, Herts., Anglujo

OFICIALA INFORMILO

N-ro 198

Ĝan de Septembro 1947

NOVAJ DELEGITOJ

Argentino

Buenos Aires. FD (Filatelo; Pentarto): José Bayon, Cochabamba 1351. Tel: 33-4135.

Belgujo

Gent. D: C. Vandevelde, 230 Peter Benoitlaan, Merelbeke.

Ĉeĥoslovakujo

Bardejov. D: D-ro V. Austerlitz, Dlhy rád 24.

Praha. FD (Katolikismo): J. Bambásek, Trída Krále Jirho VI. 57, Praha VII.

Danujo

Middelfart. D: P. Christensen, Buggesgade 26.

Troldhede. FD (Vegetarismo): V. Nygaard, Nr. Vium, Troldhede. Tel: Nr. Vium 37.

Francujo

Carpentras (Vaucluse). D: S-ino E. Bonnafous, Bould. des Boëttes.

Thouars. D: H. Fiez, 26 Avenue Victor Leclerc. Tel: 27.

Germanujo

Augsburg. FD (Ukrainaj aferoj): M. V. Dolnycky, (13b) Augsburg-Gögingen, Langerichstr. 1-I, Bayern.

Bremen. FD (Korespondado; Studentaj aferoj): G.K.F. Ziegler, (23) Bremen, Stolbergerstr. 13. Tel: 4 09 34.

Wolfsburg. D: E. Lüer, (20) Wolfsburg, Goethestr. 31-II. Tel: 2311.

Hungarujo

Budapest. FD (Dentistaj aferoj): D-ro J. Brand, IV, Haris bazár 4-I-2. Tel: 181-359.

FD (Dermatologio): D-rino M. Avar, VIII, Baross ucca 28. Tel: 137-832.

FD (Fabrikej-organizado): I. Avar, VIII, Üllői ut 30.II.10. Tel: 136-465.

FD (Filatelo): D-ro V. Tóth, III, Jolsva u. 4.

FD (Grajnkulturado): I. Kazár, IV, Váci-utca 84. Tel: 384-306.

FD (Inĝenieraj aferoj): G. Kellner, Hungaria körut 126. Tel: 297-240.

FD (Studenta korespondado): G. Kovács, VIII, Üllői-ut. 20. Tel: 139-392.

Győr. VD: P. Türi-Kováts, Homok-u. 7.

FD (Ciganoj): La VD.

Gyula. D: K. Fazekas, Kossuth-tér 22.

FD (Oficistaj aferoj; Filatelo): La D.

Pécs. FD (Fervojista kaj ŝipista aferoj): M. Hollay, Aidinger János str. 13.

Ujpest. FD (Tajloraj aferoj): G. Császár, Vasvári Pal u. 34.

Italujo

Bologna. D: D-ro O. Nanni, Palazzo Pizzardi, Via d'Azeglio 38. Tel: 21583-1198.

Messina. D: G. Viti, Via XXIV Maggio 21.

Kanariaj Insuloj

La Laguna. FD (Studentaj aferoj): J. Díaz Duque, Apartado 59.

Santa Cruz de Tenerife. D: S-ino E. Wolff, Angel Guimerá 47.

Liechtenstein

Nendeln. D: F. Hasler-Wanger, Nendeln No. 9.

Madejro

Funchal. FD (Sporto): J. Tito de Andrade, Banco da Madeira. Tel: 685.

FD (Vinkomerco): J. Vieira, Rua da Rochinha 17.

Nederlando

Amersfoort. D: S-ino G. Salomons-Ruardi, De Bosch Kemperlaan 11. Tel: 6817.

Bergen-op-Zoom. FD (Komerco): J. F. C. M. Dercks, Antwerpsche str. 45. Tel: 311.

Rotterdam. FD (Hidraŭliko): J. Noordhoek, v. Houtenstraat 24c, Rotterdam-C. Tel: 49,046.

Polujo

Katowice. D: P. Kulozik, ul. Wodna 3 m. 15, Katowice I. Tel: 31977.

Szczecin. D: E. Jakubiczka, Kaszubska 59 m. 2.

Sud-Afriko

Johannesburg. FD (Inĝenieraj aferoj): U. P. Ronald, c/o Divis. Eng., G.P.O. Tel: 322221.

Svedujo

Ĉefdelegito: Einar Adamson, Värmlandsgatan 18, Göteborg. Poŝtĝiro: 44381. Tel: 145840.

Karlskoga. FD (Metiinstruado): O. Ragnar Lindahl, Hopslagarevägen 54. Tel: 25162.

Kungsbacka. FD (Fervojoj): J. A. Hansson, Ringgatan 8. Tel: 2.

Svisujo

Amriswil. D: Franz Rispy, Amriswil, Thg. Tel: 450.

Usono

Bloomington (Indiana). FD (Universitataj aferoj): H. French, P.O. Box 501. Tel: 4298.

Chapel Hill (N. Carolina). D: L. A. Sharpe, 114 Polk Street.

Pasadena (California). FD (Bahaismo): J. E. Falk, 525 North Lake Ave.

ŜANĜOJ

Argentino

Córdoba. VD: vakas.

Belgujo

Liège. D: adresŝanĝo: Quai de l'Ourthe 27.

Britujo

Edinburgh. VD: vakas.

Manchester. VD (Junulgastejoj): vakas.

Newport Pagnell. D: vakas.

Timperley. D: vakas.

Ĉeĥoslovakujo

Karlovy Vary. FD (Komerco-porcelano): vakas.

Danujo

Vester Vedsted. D: vakas.

Egiptujo

Alexandria. FD (Juro): vakas.

FD (Turismo): vakas.

Cairo. FD (Propagando): vakas.

Kanado

Hamilton. D: vakas.

Nederlando

Laren. D: nova adreso: Berkenlaantje 29.

Polujo

Dzierżonów. D: vakas.

DUMVIVAJ MEMBROJ

S-ino L. Bodmer, Zürich, Svisujo.
S-ro B. Hansen, København, Danujo.
F-ino O. James, Cardiff, Kimrujo.

MEMBRO-SUBTENANTOJ 1947

288. S-ro H. Boffejon, Antwerpen, Belgujo.
289. S-ro L. Magotteaux, Liège, Belgujo.
290. S-ro D. Quarello, Buenos Aires, Argentino.
291. S-ro A. Spiré, Buenos Aires, Argentino.
292. S-ro M. Mittag, Hannover, Germanujo.

STATISTIKO

Jen la stato de la membraro je la 31a de Aŭgusto 1947,
kaj ankaŭ, por komparo, je la fino de Aŭgusto 1946:

	1946	1947
Asociaj membroj ..	6916	7003
Individuaj membroj:		
MJ	1034	1046
MA	4042	5091
MS	248	289
Patronoj ..	24	22
DM	96	149
HM	20	53
	5464	6650
	12380	13653

CECIL C. GOLDSMITH, *Sekretario.*

ENIGMA KONKURSO N-ro 20

Solvojn oni sendu al S-ro P. H. Mooy, 106 rue Général
Lotz, Brussel-Uccle, Belgujo

Gajnis la premiojn post kontrolo de la 16-a
konkurso: S-ro B. S. Trier (Dan.) 93, Pastro J. S.
Dinwoodie (Brit.) 92,5, S-ro Fr. Taylor (Brit.) 91.

Enigmo N-ro 46: (Ensendis S-ro Frolíšek,
Ĉeĥoslovakujo).

El la subaj 48 silaboj faru 16 vortojn. La
duaj literoj de supre malsupren nomas konatan
verkiston, la kvaraj literoj nomas lian mond-
konatan verkon.

a - a - a - ci - da - di - do - e - i - i - ka - kan -
ki - ko - kor - li - li - lo - lo - me - mo - na -
nas - ni - no - no - o - o - o - pa - po - po - ra -
ri - so - so - sple - stag - te - ter - ti - to - tri -
tri - trin - voj - zi.

La signifoj de la vortoj estas: 1. poemeto;
2. mezurilo por medikamentoj; 3. vegetaĵo;
4. senmovo; 5. birdoj; 6. kantbirdo; 7. mal-
fluida; 8. spasme elspiras; 9. aparte instruata
al adeptoj; 10. melankolio; 11. scienco; 12. gluti
fluaĵon; 13. lando; 14. kiel unua proponi ion;
15. vegetaĵo; 16. trinkvazo.

Enigmo N-ro 47: Antaŭ multaj jaroj juna
poeto Nikodemo Rimulo enamiĝis en belega
knabino, Maria Bakker, kiu tamen ne reciprokis
tiun amon, sed edziniĝis kun honesta, do malriĉa,
ĉarpentisto Jansen. Pro tio la poeto senluziĝis
kaj fariĝis buĉisto, sed lia amo por Maria ne povis

morti, kaj ĉion, kion li eksciis rilate ŝin kaj la
ŝiajn li notis en sian tagregistron, kie inter notoj
kiaj *du funtoj da bovidaĵo kun medolosto, unu
funto da viandhakitaĵo* k.t.p. estis legeblaj sur la
grasetaj palpmakulitaj paĝoj la jenaj notoj:

Maria naskis filon, kiun ŝi baptis Karlo. La
ĉarpentisto mortis, ĉu mi nun povus esperi?
Maria edziniĝis kun mia konkurencanto Petro
Fabo. Maria denove naskis filon, Hermano.
Maria ankoraŭ naskis filon, Fernando. Maria
mortis. Petro Fabo denove edziĝis kun vidvino
Violetta Jakobs, kiu jam havas filinon, Helena.
Violetta naskis filon, Johano. Violetta denove
naskis filon, Frederiko. La laktisto rakontas ke
Karlo edziĝis kun Helena, kaj ke ili havas filinon,
Rosa. Violetta mortis pro akcidento.

Dum kelkaj jaroj post tio li nenion bezonis noti;
fine li skribis: La maljuna Petro edziĝis kun
Rosa. Rosa naskis ĝemelojn, Luiza kaj
Gerbrando.

Bonvolu nun respondi al la jenaj demandoj:
1. Kiu povas diri, ke lia frato estas la onklo de
lia patrino? 2. Kaj kiu, ke lia patro edziĝis kun
lia nevino? 3. Kiu povas diri:
Mi havas kvar onklojn—du flanke de mia patro
kaj du flanke de mia patrino? Kiuj ili estas?
4. Kiel nomiĝas la avoj de Gerbrando? 5. Kion
diras Luiza al Fernando? 6. Kion diras Violetta
al Luiza?

Por ĉiu korekte respondita demando unu poenton.

(Bonvolu noti, ke sekve de manko de spaco,
ĉi tiu rubriko de nun estas iom mallongigita).

EDZIĜO

Piha—Mehres—Je la 11a Septembro edziĝis Salomon
Piha (Dumviva membro en Alexandria, Egiptujo) kun
Fortunée Mehres.

ANIAJ MORTINTOJ

Schroevers—Je la 31a Aŭgusto forpasis nia delegito en
Vlissingen, Nederlando, S-ro R. Schroevers.

Steyer—Je la 7a Septembro mortis malnova Esperanto-
pioniro Karlo Steyer, en Brno, Ĉeĥoslovakujo, je la aĝo 61.
Sur la lasta vojo lokaj Esperantistoj adiaŭis lin, kaj
florkrono kun surskribo en la verda lingvo ornamis lian
ĉerkon.

RIDO SANIGAS

IVAN GEORGIEV — TODOR ISEV

Bona kolekto de anekdotoj

Prezo aŭfrankite 9 pencoĵ (3 respondkuponoj)

Mendu ĉe U.E.A.

KOTIZOJ 1948

Lando	MJ	MA	MS	Pat.	Jarl.	Esp.	Valuto
Argentino ..	4	10	20	100	65	7	pesoj
Aŭstralio ..	5	12/6	25	125	80	8	angl. ŝil.
Aŭstrujo ..	10	25	50	250	160	20	sch.
Belgujo ..	45	112	225	1120	720	75	fr.
Brazilo ..	20	50	100	500	320	35	kru.
Britujo ..	15*	22/6*	35*	135*	80	8	ŝil.
Bulgarujo ..	—	750	—	—	—	—	levoj
Ĉeĥoslovakujo ..	50	125	250	1250	800	80	kĉs.
Danujo ..	5	12.50	25	125	80	8	kr.
Finnlando ..	135	350	700	3500	2200	250	fmk.
Francujo ..	120	300	600	3000	1920	200	fr.
Germanujo ..	vidu paĝon 146						
Hispanujo ..	vidu paĝon 146						
Hungarujo ..	12	30	60	300	200	20	for.
Islando ..	6.50	16	32	160	105	10	kr.
Italujo ..	vidu paĝon 146						
Jugoslavujo ..	vidu paĝon 146						
Kanado ..	1.25	3	6	30	16	2	dol.
Nederlando ..	2.75	6.75	13.50	67.50	44	4.50	fl.
Norvegujo ..	5	12.50	25	125	80	8	kr.
Nov-Zelando ..	5	12/6	25	125	80	8	angl. ŝil.
Palestino ..	250	625	1250	6250	4000	400	mil.
Polujo ..	vidu paĝon 146						
Portugalujo ..	25	60	125	600	400	40	esk.
Svedujo ..	4	10	20	100	60	7	kr.
Svisujo ..	4.50	11	22	110	72	7.50	fr.
Urugvajo ..	2	4.50	9	45	30	3	pes.
Usono ..	1.25	3	6	30	16	2	dol.
Aliaj landoj ..	5	12.50	25	125	80	8	angl. ŝil.

* enhavas la kotizon al B.E.A.

Klarigoj

MJ = membro kun jarlibro.

MA = kun jarlibro kaj gazeto.

MS = Membro-subtenanto.

Pat. = Patrono.

Jarl. = prezo por tutpaĝa reklamo en la jarlibro. Duonpaĝa kaj kvaronpaĝa reklamo kostas proporcie. *Entrepreneoj* ne plu ekzistas.

Esp. = la kosto de aparta abono al *Esperanto* por tuta jaro.

Bonvolu pagi la kotizon al la kutima pagejo kiel eble plej frue.
Tio multe helpos al ni kaj evitos interrompon en la livero de la gazeto.

GAJA LEGANTO PER ESPERANTO

de P. E. SCHWERIN

Spritaĵoj – Vortludoj
Preseraroj – Anekdotoj
Matematikajoj – Rimajoj
Societludoj – Demandaro
Konsiloj por Grupestroj
kaj Kursgvidantoj.

Prezo :

1 ŝil. 3 pencoj, afranko 1p.
aŭ 5 int. rpk. afrankite.

Eldonita de

THE ESPERANTO PUBLISHING CO. LTD.

Mendu ĉe U.E.A.

DENOVE HAVEBLAJ

sed atentu la novajn prezojn

FUNDAMENTA KRESTOMATIO de la lingvo
Esperanto. D-ro L. L. Zamenhof.

472 paĝoj, broŝ. 6ŝ. 9p., afranko 6p. (29 rpk.)

LINGVAJ RESPONDOJ. D-ro L. L. Zamenhof.

116 paĝoj, broŝ. 2ŝ. 6p., afranko 3p. (11 rpk.)

HAMLETO. Wm. Shakespeare (L. L. Zamenhof).

176 paĝoj, broŝ. 2ŝ., afranko 3p. (9 rpk.)



Mendu ĉe

UNIVERSALA ESPERANTO-ASOCIO

Heronsgate, Rickmansworth, Herts., Anglujo

DENOVE HAVEBLA



ZAMENHOF- RADIKARO

EUGEN WÜSTER

kun derivaĵoj kaj fontindikoj

Prezo : 6 ŝil., afranko 3p.



Mendu ĉe

UNIVERSALA ESPERANTO-ASOCIO

Heronsgate, Rickmansworth, Herts., Anglujo

LA LIBRO DE LA SPIRITOJ

“... bonege taŭgas por ĝustigi tiujn opiniojn
kaj por forigi la miskomprenojn.”—*Heroldo de
Esperanto.*

“... Pri unu afero mi estas tre kontenta ; la
lingvo estas modela.”

“... Mi senhezite diras, ke laŭ vidpunkto
pure lingva ĉi tiu verko estas la plej kontentiga,
kiun mi ĝis nun legis en Esperanto ... la
frazoj portas la stampon pri instruiteco kaj
ŝato pri la plej ĝusta vorto por atingi la
bezonatan nuancon ... La rezulto estas libro
pri kiu iu ajn literaturo povus esti fiera. Por
la Esperanta ĝia valoro estas netaksebla ...”—
Esperanto Internacia.

531 paĝoj, 19 × 14 cm., broŝ. 10ŝ. 6p.,

tole bind. 12ŝ. 9p., duonlede bind. 25ŝ. 6p.,
afranko 9p.

Mendu ĉe U.E.A.